

Redaktoro:

Jozefo Németh

Vicredaktoro:

Katalin Kováts

**Kunlaborantoj
de la aktuala numero:**

Boo Mee Kim-Lindblom

Stefan MacGill

Radojica Petrović

Mauro La Torre



La nova estraro de ILEI!

(p. 17-20.)



Internacia Infana Kongreseto 2003

(p. 16.)

ilei

Organo de Internacia Ligo
de Esperantistaj Instruistoj

ENHAVO

Radojica PETROVIĆ: <i>Kio estas ILEI?</i>	1
<i>Plijuniĝo kaj organiza refortiĝo – konferenca raporto</i> (R. PETROVIĆ).....	5
Mauro LA TORRE: <i>(Re)Saluto – publika letero</i>	8
Mauro LA TORRE: <i>Tago de Lernejo 2003</i>	9
Hokan LUNDBERG: <i>E@I – nova partnero de ILEI</i>	11
<i>Intervjuo kun Mark Fettes</i> (Katalin KOVÁTS)	13
Stefan MACGILL: <i>Someraj sonoj ĉe norda lago (IJK)</i>	16
<i>La nova estraro de ILEI (biografioj)</i>	17
Ronald J. GLOSSOP: <i>Kial oni devus lerni Esperanton?</i>	21
Magali von BLOTTNITZ: <i>Sudafrikanoj prezentis E-on... (+ IK2)</i>	23
<i>El la landoj kaj sekcioj</i> (BR, JP, KR, CR, HR, LT, NL, NO, PL, RO, TZ, US).....	28
<i>Reago</i> (Maria MAJERCZAK)	35

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Radojica Petrović, Bul. oslobodjenja 36/14, YU-32000 Ĉaĉak, Serbio. Tel. (+381) 32 371053. Fakso: (+381 32) 342 101 <radp@ptt.yu> *Kunordigado, eksteraj rilatoj, la projekto Interkulturo*

Vicprezidanto: Stefan MacGill, Pannonia u. 30. I/6, HU-1136 Budapeŝto, Hungario. Tel. (+36 1) 349-5207, <stefan.macgill@galamb.net> *Eldonado (inkl. periodaĵojn), Int. Infana Kongreseto (komisie de UEA)*

Sekretario: Atilio Orellana Rojas, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando. Tel.: (+31 70) 3556677, <iei001@tiscali.nl>. *Konferencoj*

Vicsekretario: *vakas*

Estrarano pri financoj: Boo Mee Kim-Lindblom, Stenbockensgata 102, SE-136 62 Haninge, Svedio. Tel./fakso: (+46 8) 777 4175, <boomee.kimlindblom@swipnet.se>


Estrarano: Hokan Lundberg, c/o stan Pivalica, Tadeuša Koščuška 80/18, YU-11000 Beograd, Serbio. Tel. (381 11) 188 496, <hokan@ikso.net> *Retprojektoj, junulara agado, informado*

Estrarano: Mauro La Torre, Dipartimento di Scienze dell'Educazione, Università Roma Tre, Via Castro Pretorio, 20, IT-00185 Roma, Italio. Tel.: (+39) 06 44 62 092 aŭ 06 49 57 805, fakso: (+39) 06 49385673. <mauro.latorre@uniroma3.it>; <http://lps.uniroma3.it> *Universitata kaj scienca agadoj*

Estrarano: Aleksandr Blinov, Pr. I. Jakovleva 10A-63, RU-428027 Ĉeboksari, Rusio. Tel.: (7 8352) 665 908, <delfeno@chtt.ru> *Lerneja agado, instrukapabligo, ekzamenoj*

KIO ESTAS ILEI?

La Statuto difinas la Internacian Ligon de Esperantistaj Instruistoj faka organizo pri edukado kaj instruado, kaj preskribas ke ĝia oficiala lingvo estas Esperanto. Sed kiel ĝi praktike rekoneblas – kio estas ĝiaj aperformoj kaj agadefikoj en kaj ekster la E-komunumo?



Membroj

Ĉiun organizaĵon faras unuavice ĝia membraro. La Statuto de ILEI preskribas, ke ĉiu persono kiu rekonas la Statuton, okupiĝas aŭ interesiĝas pri edukado kaj instruado, rajtas membriĝi. Efektive ILEI havas malpli ol 500 membrojn, eĉ malpli da pagitaj kotizoj por 2003 - tro malmulte kompare kun la nombro de esperantistoj kiuj plenumas la statutan kondiĉon por membriĝi, kaj ne sufiĉe por adekvate respondi al la bezonoj de la propra agadkampo: edukado kaj instruado. ILEI devas plivastigi sian celgrupon kaj turni sin ne nur al siaj kotizpagantoj, sed al ĉiuj esperantistaj instruistoj kiuj kontribuas aŭ povas kontribui al ĝiaj celoj. Tio precipe validas por junaj esperantistoj aŭ tiuj el malriĉaj landoj kiuj eĉ ne povas pagi la kotizon, sed havas ideojn, volon kaj kapablon por agi. Necesas enkonduki novajn formojn de membreco kaj partopreno en la laboro, kaj novajn servojn adaptitajn al la pli vasta celgrupo. La unuaj ideoj pri nova ampleksa kaj plurdimensia projekto „Flugiloj de Malfacila Vento”, kiuj venis el la rondoj de TEJO, montras direkton al tiu celo.

Organiza strukturo

Estas tri organizaj instancoj laŭ kiuj ILEI rekoneblas: sekcio (organiza unuo kiu agas en difinita teritorio), la Komitato (la supera decida instanco en kiu ĉiuj sekcioj estas reprezentitaj) kaj la Estraro kiu gvidas la Ligon. Sur la lasta kovrilpaĝo de ĉi tiu revuo troviĝas nomoj de 31 sekcioj kaj ankoraŭ 15 reprezentantoj de ILEI en landoj kie ne ekzistas sekcio sed ekzistas individuaj membroj, kiuj ankaŭ povas havi siajn reprezentantojn en la Komitato laŭ difinita kriterio. Do ILEI organize ĉeestas entute en 46 landoj – nombro notinde malpli granda ol la nombro de landoj en kiuj Esperanto estas instruata, aŭ de landoj el kiuj ĉiujare

venas partoprenantoj de la Universala Kongreso de Esperanto. Tiu nombro fariĝas eĉ pli malgranda konsiderante malfortajn rilatojn de la Estraro kun pluraj sekcioj kaj reprezentantoj: la Estraro ne konas iliajn staton kaj problemojn, ili ne reagas al iniciatoj kaj demandoj de la Estraro, kaj malpli ol 15 landaj sekcioj regule aperigas siajn agadraportojn sur la paĝoj de IPR. Sen efektive aganta sekretario en la lastaj tri jaroj, kun demisioj de kelkaj estraranoj kaj preskaŭ du jarojn sen estrarkunsido, ILEI lastjare atingis kulminon de sia organiza krizo. La 36-a Konferenco de ILEI kaj la ILEI-aranĝoj en la lasta UK kuraĝigas, ke la Ligo havas kaj akiras novan forton por superi la krizon.

Agado

La bildon de iu organizo kompletigas ĝia agado. Ĉiu kiu scias pri la *Tago de Lernejo*, *Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA* – elementa kaj meza, *IPR*, *Juna Amiko*, *Tendaraj Tagoj*, *Okulo*, la projekto *Interkulturo*, retdiskutejoj e-ins kaj ILEI-kom, memoras ilin ligite al la nomo de ILEI. Kaj kion ankoraŭ? Foliumante malnovajn volumojn de IPR oni trovas sur la dua kovrilpaĝo diversajn agadkampojn taskitaj al diversaj estraranoj: trejnado de instruistoj, statistikado de instruado, Gimnazio de ILEI, eldonado, instruado al infanoj, servoj al instruistoj, lerniloj, metodikaj seminarioj, terminaro, universitata agado, lernejoj projektoj. En kelkaj el tiuj agadkampoj agas aliaj institucioj kaj unuopuloj atingante notindajn rezultojn sen adekvata subteno de ILEI. La nova Estraro elektita en la 36-a Konferenco redifinis taskokampojn de la estraranoj konforme al la prioritatoj kiujn aprobis la Komitato kaj planas plifortigi kaj plivastigi kunlaboron kun la jamaj kaj novaj partneroj en tiuj taskokampoj.

Konferenco

La ĉefa ĉiujara evento de la ILEI-vivo, la *Konferenco*, estas kontrolpunkto de la organizo kaj ĝia spegulo kiu bildigas ĝiajn staton kaj evolutendencojn. Kelkdeko da partoprenantoj ĉiujare ankaŭ donas siaspecan bildon de la organizo. Varia programo, kutime ne tre densa – kelkaj prelegoj, komitatkunsidoj, somera turismado, vesperaj distraĵoj kaj kelkfoje paralelaj seminarioj – diversgrade kontentigas iliajn ŝatojn kaj gustojn. La *Konferenco* tamen estas unika okazo por kunvenigi la agantojn pli amase kaj kontentigi la bezonojn pli vaste. Mankas, ekzemple, pripedagogiaj kaj organizaj kolokvoj, metodikaj seminarioj kaj ekzamenoj, laborgrupa planado de komunaj projektoj ks.

Revuoj

Internacia Pedagogia Revuo (IPR) kaj *Juna Amiko* estas identigiloj sen kiuj ILEI ne imageblas, kaj kiuj ne imageblas sen ILEI. Tamen ilia pluekzisto ne estas certa ĉar la Ligo havas grandajn financajn problemojn. *Juna Amiko* havas klaran fizionomion de altkvalita revuo por bazlernejanoj, kun ambicio kontentigi ankaŭ bezonojn de aliaĝaj komencantoj.

IPR estas organo de ILEI kun miksita taskaro de interna bulteno kaj de faka revuo, liveranta gravajn organizajn informojn kaj variajn fakajn artikolojn. Tiu miksiĝo kaj la limigitaj financoj unuflanke malebligas pli dinamikan bultenon kaj aliflanke ne lasas sufiĉan spacon por pli ampleksa scienca traktado de E-pedagogia problemaro.

La Interreto proponas iujn solvojn, sed necesas pensi ankaŭ pri aparta edukscienca revuo kian bezonas la E-komunumo. Aparta problemo estas manko de revuo, reta aŭ papera, kiu renkontus la bezonojn de junaj instruistoj kaj instruemuloj. Solvon por ĝi promesigas la komencita kunlaboro kun TEJO kaj ĝia laborgrupo E@I.

Internaciaj ekzamenoj

La *Internacia Ekzamena Komisiono (IEK)*, kiun nomumas la Komitatoj de UEA kaj ILEI laŭ propono de la Estraro de ILEI, praktike memstare zorgas pri la elementa kaj meza internaciaj ekzamenoj havante apenaŭ pli ol 10 ekzamenitojn ĉiujare. La bezonoj estas multe pli vastaj. Aparte mankas ekzamenoj pri instrukapablo – ekzistas regularo pri ĝi, sed ne ekzamenmaterialoj kaj praktiko. ILEI estas unu el raraj fakaj organizoj kiuj ne ebligas al siaj membroj diplomojn en sia fako. Jen grava tasko por ILEI kaj IEK.

Interkulturo

ILEI, kun morala subteno de UEA, lanĉis la projekton *Interkulturo* en 1999 kiel lernejan projekton por aplikado de Esperanto al interkultura edukado kun retpaĝaro titolita *Kvazaŭa Lernejo „Tibor Sekelj”*, kiu havis sian furoran periodon kaj rapidan estingiĝon pro kelkaj neantaŭviditaj kaj ne adekvate solvitaj problemoj. *IPR* jam informis kaj plu informos en apartaj artikoloj pri relanĉo de Interkulturo en nova eldono – *IK2*, kun novaj homfortoj, novaj metodaj kaj teknikaj solvoj, financa subteno de

*Esperantic Studies Foundation (ESF)*¹ kaj komencita konfirmiĝo ankaŭ en neesperantistaj medioj.

Retmedio

La retpaĝaro de ILEI gastas ĉe unu el la serviloj de la Tria Roma Universitato, ne sen problemoj, same kiel la Kvazaŭna Lernejo „Tibor Sekelj”.

La revuoj IPR kaj Juna Amiko havas proprajn paĝarojn ĉe aliaj serviloj². ILEI posedas la retregionon *interkulturo.org* kun la celo servi kiel pordego al diversaj interkulturaj projektoj kaj agadoj de ILEI aŭ interesaj por ILEI. Por la bezonoj de IK2 estas uzata retregiono *interkulturo.net*. Apartaj paĝoj aŭ prezentoj de ILEI kaj Interkulturo gastas ĉe *uea.org*, *edukado.net* kaj *vikipedio*. ILEI havas kvar diverse aktivajn diskutlistojn ĉe *Yahogroups*. Evidente necesas resistemigi kaj plu evoluigi ĉiujn tiujn kaj novajn uzojn de Interreto. Tial la Estraro difinis apartan taskokampon por tiu bezono – retprojektoj, ligitan al junulara agado kaj informado.

Partneroj

La partneroj estas tiu grava faktoro kiu grandparte difinas la agadkapablon de iu organizo, kiel nepra kondiĉo, kaj kiel pruvo. ILEI membras en UEA kiel faka asocio kaj, pli ol tio, per aparta interkonsento el la jaro 1990, ĝi transprenis zorgon pri la interesoj de UEA rilate al altigo de la lingva kaj kultura nivelo de la E-parolantoj, disvastigado de instruado de Esperanto kaj tiucela rilatado kun edukaj instancoj. La vortoj de la interkonsento ne realiĝas ĉiam glate kaj ILEI sentas bezonon je pli konvinka financa kaj oficeja subteno de UEA por la transprenitaj taskoj, precipe konsiderante ke la instruado de Esperanto estas unu el la tri prioritataj agadkampoj de la Strategia Plano de UEA. Tiu temo estos plu traktata inter la du organizoj. En tiu kunteksto estos serĉata vojo al pli konkreta kunlaboro kun *IEI*, *AIS*, *ISAE*, universitataj katedroj kie Esperanto kaj interlingvistiko estas instruataj, E-centroj kaj kursejoj, instruistaj sekcioj de Landaj Asocioj de UEA kaj aliaj institucioj en la sama agadkampo.

¹ Vidu la intervjuon kun Mark Fettes en ĉi tiu numero de IPR (p. 13.)

² **Atentu, IPR havas novan TTT-adreson: www.tarczy.rlan.hu/ipr/**

Aparteno de ILEI al Unesko³ kaj *FIPLV (Internacia Federacio de Instruistoj de Modernaj Lingvoj)* kaj prelegoj pri niaj kulturprojektoj en iliaj konferencoj⁴ malfermas al esperantistaj instruistoj novajn agadspacojn ĉe tiuj organizoj.

Nia partopreno en la konferenco de *ACODDEN*³ (*A Classroom of Difference – Diversity Education Network*) kreis novan ŝancon por penetro en kultur-edukajn mediojn de Eŭropo kaj partneriĝo kun diversaj edukaj institucioj kaj subvenciantoj montrintaj intereson pri la projekto Interkulturo. Notinde novan forton portis al ILEI la partneriĝo kun la faka sekcio de TEJO „*Esperanto ĉe Interreto*” (*E@I*)⁵, kun kiu ni jam realigas la novan eldonon de Interkulturo (IK2) kaj faras novajn planojn por plijuniĝo kaj organiza plifortiĝo de ILEI. La pozitiva sinteno de ESF al IK2 kuraĝigas nin por proponi novajn projektojn kaj strebi al longdaŭre kunlaboraj rilatoj kun tiu fondaĵo.

Konkludo

Se necesas proponi unufrazan sintezan respondon al la titola demando, ILEI montriĝas sistemo de homoj, organizformoj, agadoj, informkanaloj, kunlaborrilatoj kaj solvendaj problemoj, kies ĉefa celo estas progresigo de la instruado de Esperanto kaj ĝia kulturo, kaj disvastigo de interkultura edukado per Esperanto. La forton de ILEI faras ne nur ĝiaj instancoj kaj kotizpagantoj, sed unuavice bone organizita kunlaboro kun diversaj institucioj, agantoj kaj subtenantoj en la kampo de edukado kaj instruado.

Radojica Petrović, prezidanto

La ĉefa mesaĝo de la 36-a Konferenco de ILEI:

PLIJUNIĜO KAJ ORGANIZA REFORTIĜO

La plej grava atingo de la 36-a Konferenco de ILEI, okazinta en Örestrand, Svedio, 02-07.08.2003 – laŭ pritakso de pluraj konferencanoj – estas plijuniĝo kaj ekkunlaboro kun TEJO. En tiu kunteksto altan

³ Raporto de la Ĝenerala Direktoro de Unesko en junio 2003 konfirmis la operaciajn rilatojn de UEA kaj ILEI kun Unesko.

⁴ Vidu apartajn informojn pri tio en tiu ĉi numero de IPR (p. 23.).

⁵ Legu apartan artikolon pri E@I en ĉi tiu numero de IPR (p. 11.).

pritakson ricevis la trejnseminario por aplikontoj de la projekto Interkulturo (IK) kiu okazis paralele kun aliaj konferencaj programoj. Ĝi estis organizita kaj realigita de TEJO-aktivuloj Sonja Petroviĉ kaj Katja Ignatieva en la kadro de kunlaboro de ILEI kaj E@I-sekcio de TEJO pri la nova eldono de Interkulturo – IK2.

Ĝeneralaj trajtoj

La Konferenco havis 59 partoprenantojn el 23 landoj, el kiuj 19 komitatanoj, 10 partoprenantoj kaj 2 prelegantoj en la IK-trejnseminario, kaj 6 infanoj kiuj prezentis du programerojn en la distra programo. En la ĝenerala programo, kiu komenciĝis per unuhora malferma kunsido, oni aŭdis 6 prelegojn (Lars Forsman, Humphrey Tonkin, Mauro La Torre, Stefan MacGill, Ronald Glossop kaj kune Hokan Lundberg kaj Sonja Petroviĉ). La ĉeestantoj partoprenis du unuhorajn diskutsesiojn (pri instru-kapablado – gvidis Radojica Petroviĉ, kaj taksado de la Konferenco – skribe kaj diskute dum la ferma kunsido), ĝuis 6 horojn da vespera distra programo, uzis 9 horojn de la ekskursita tago por ĉirkaŭveturi sudokcidentan marbordon de Svedio kaj najbarajn partojn de Danio, kaj en la cetera tempo laŭvole vizitis la libroservon de ILEI, aŭ ĝuis la agrablojn de marborda ripozejo kaj sveda somero. Krome, la Komitato kunsidis kvarfoje – entute 8 horojn, la Estraro kunsidis entute 3 horojn, kaj la teamo de IK kunsidis 1 horon kaj duonon por resumi la ĝisnunan laboron kaj plani la pluan. La IK-trejnseminario havis entute 25 laborhorojn.

Komitato

Post la enkondukaj formalajoj, la Komitato komencis sian laboron per aprobo de tri novaj sekcioj: en Koreujo, Venezuelo kaj Ukrainio. Poste, laŭ la ordo kutima por elekta kunsido, la Komitato aŭdis kaj aprobis raportojn de la Estraro, komisionoj, reprezentantoj ĉe Unesko, pri rilatoj kun FIPLV kaj la financon. Estis elektita nova Elekta komisiono kaj malŝarĝita la malnova Estraro. La Elekta komisiono prezentis liston de 7 kandidatoj por la Estraro kaj, post aprobo de la listo sen aldono de novaj kandidatoj, realigis la proceduron de elekto de prezidanto kaj 6 ceteraj estraranoj. La Komitato elektis ankaŭ novajn membrojn de Kontrola komisiono. Listoj de la elektitoj kaj iliaj postenoj legeblas sur la dua kaj tria kovrilpaĝoj de IPR.

La Komitato konstatis agadrezultojn kaj problemojn de ILEI ĝenerale kaj de unuopaj sekcioj. Analizinte la krizan staton de la Ligo en la organiza kaj financa sencoj, ĝi aprobis jenajn prioritatojn por la plua laboro:

- Organiza plifortiĝo de ILEI: pli firma kunlaboro de la Estraro kun la komitatanoj, sekcioj, kaj landaj reprezentantoj, kaj kun aliaj instancoj de Esperanto-komunumo, plijuniĝo, plivastigo de la celgrupo kaj plimultigo de la abonantoj de Juna Amiko.
- Instrukapablado kaj plilertigado de E-instruistoj kaj instruantoj.
- Interkulturo kaj aliaj instruprojektoj.

Cele al organiza plifortiĝo kaj altirado de novaj agantoj en la eduka kampo, la Komitato konkludis ke necesas enkonduki novan membrokategorion – membro sen revuo. Ĝi ebligis membriĝon de esperantistoj, precipe junuloj, kiuj deziras agi en ILEI sed ne povas pagi la plenan kotizon kaj/aŭ ne deziras ricevi la revuon. La Komitato taskis al la Estraro proponi taŭgan minimuman aŭ nulan kotizon por tiaj membroj kaj prepari la necesajn formalajojn por oficiale enkonduki la novan membrokategorion dum la Konferenco 2004, aldone al la ekzistantaj membrokategorioj. Rilate al la nunaj kotizoj, la Komitato aprobis necesan plialtigon por kovri la kreskon de la kostoj (18 EUR/ 9 EUR). Ĝi ankaŭ aprobis eldonplanon kaj novan kotiztabelon de Juna Amiko por la jaro 2004. La novaj kotizoj estas indikitaj sur la antaŭlasta kovrilpaĝo de IPR. La Komitato pozitive pritaksis la novan evoluon de la projekto Interkulturo kaj invitis la sekciojn al ĝia aplikado. Ĝi taskis al la Estraro fari la necesajn paŝojn en la kampo de instrukapablado. Rilate al projekto de trejnseminario por instruistoj kiun preparis Katalin Kováts kaj Mireille Grosjean, la Komitato pritaksis ĝin grava kaj konsiderinda en la kunteksto de la prioritato Instrukapablado, sed ne matura por findecido ĉar mankas konkreta programo kaj buĝeto. La Komitato aprobis proponon de la Estraro ke la Konferencoj en 2004 kaj 2005 okazu en la landoj de UK, respektive Ĉinio kaj Litovio.

Estraro

La Estraro kunsidis kelkfoje por trakti kurantajn aferojn de la Konferenco kaj Komitato, kaj por organizi sian laboron en la sekva periodo. Konforme al la aprobitaj prioritatoj kaj taskoj ricevitaj de la Komitato, la estraranoj difinis siajn taskokampojn, kiel indikite sur la dua kovrilpaĝo de IPR, kaj interkonsentis havi novan kunsidon en novembro 2003. Dume

la Estraro funkcios per retroŝta komunikado kun aparta koncentriĝo de retroŝta laboro en ĉiu lasta plena semajno en monato ('retpoŝtaj estrarkunsidoj'), laŭ tagordo aparte interkonsentota por ĉiu el tiuj semajnoj. Ĝis la semajno 22-28.09.2003 ĉiuj estraranoj proponos laborplanojn por siaj taskokampoj, kiujn la Estraro akordigos en sian agadplanon.

Pritakso

En skribaj kaj buŝaj pritaksoj dum la ferma kunsido, la Konferenco ĝenerale estis pritaksita kiel sukcesa, kun bona etoso kaj interesa, varia kaj ekvilibra programo, abunda tamen ne tro densa. Plejmulto de la konferencanoj emfazis bonan elekton de la loko por la Konferenco, agrabla kaj taŭga por ambaŭ, laboro kaj ripozo, kaj kun bonaj manĝaĵoj. Rimarkoj koncernis unuavice teknikajn aspektojn (manko de printilo, fotokopiilo, retkonekto) kaj organizon de la komitatkunsidoj (manko de presita tagordo, kelkaj punktoj ne bone preparitaj, kelkfoje mallerta gvidado de kunsido, tro longa daŭro). Konklude, la organizantoj Bertil Andreasson kaj Boo Mee Kim-Lindblom meritis varman dankon. Pli detala analizo de la pritaksoj donos utilajn instruojn al organizantoj de sekvaj renkontiĝoj.

Radojica Petrović, prezidanto

Maŭro La Torre:

(RE)SALUTO

Karaj Esperanto-instruantoj,

en la ĵusa konferenco en Orestrando (Svedujo) konkludiĝis mia 5-jara prezidado, kiu komenciĝis en Montpeliero. Okazokapte, permesu al mi rapidan bilancon, kiu, per siaj "lumoj kaj mallumoj" povas helpi al kreskado de nia Internacia Ligo.

Miavide estis "lumoj" la vastigo de la panoramo al kiu ILEI tradicie rigardis, ampleksigante nian horizonton al ĉiuj instruantoj de la lingvo, trans la etaj limoj de *faka asocio*, strebante la alfronton de ĉiaj problemoj de la instruado kaj lernado en si mem, laŭ la nuna strategio de la tuta Esperanto-movado, organizata en *UEA/TEJO/ILEI*. Apartan atenton ni volis doni al la instruado en la formalaj lernomedioj (bazaj lernejoj kaj universitatoj) kaj al la novaj teknologiaj Interretaj "lernejoj".

Kun la intenco proponi nian lingvon en la lerneja mondo, ne kiel celon en si mem, sed kiel ilon – klare utila ankaŭ por la neesperantistaj kolegoj – ni lanĉis la projekton INTERKULTURO, kiel sistemon de interklasa kunlaborado, *por* edukado al kultura egalrajteco, *per* la Internacia Lingvo kaj la komputila interreto.

Evidentaj "mallumoj" estis la malfortika asocia strukturo kaj la malkapablo kunordigi la laboron de niaj kuraĝaj volontuloj en kvazaŭ profesian organizon. Tio parte fiaskigis niajn planojn kaj revojn, sed bonŝance ne tute malkuraĝigis la agantojn kaj agemulojn.

Kiel vi ekvidas, nun ni elektis novan 7-kapan estraron, kiu estas pli riĉa laŭ kompetentoj kaj pli kompleta laŭ funkcioj. Ankaŭ la dezirata *plijuniĝo* realiĝas per eniro de du eks-TEJO-aj membroj. Ĉi tiuj objekte pli favoraj kondiĉoj kune kun la firma stirado de la nova prezidanto povos konduki nian boaton tra la malfacilaj maroj al pli fekundaj kampoj. Inter la alfrontotaj kampoj estas ankaŭ la scienca kaj universitata agado, pri kiu ni proponas al vi niajn planojn venontnumere, sed por kiu jam tre bonvenos viaj kontribuoj.

*Maŭro La Torre,
prezidinto, nuna estrarano pri scienca kaj universitata agado*

Maŭro La Torre:

TAGO DE LERNEJO 2003

Ĉi-jare la programo de la *Tago de Lernejo* (Universala Kongreso en Gotenburgo) daŭris pli ol kvar horojn. Ĝin sekvadis kun rimarkinda atento ĉirkaŭ 150 homoj, diversmaniere interesataj pri la temoj de lernado kaj instruado.

La antaŭtagmeza parto precipe temis pri INSTRUADO DE KAJ PER ESPERANTO, kun aliroj el pluraj vidpunktoj. La lingvisto Probal DASGUPTO (Univ. de Hyderabad, Barato) interese kontribuis pri *La interleksika Esperanto, kiel laborilaro por lingva prikonscio*, lumigante la rolon de la internacia lingvo ankaŭ kiel ĝenerallingvan edukilon. Pri la motivigaj aspektoj lekciis la filozofo Ronald GLOSSOP (Univ. de Sud-

Iinojsa, Usono), *Kial oni devus lerni Esperanton?*⁶ La pedagogiisto Johano NEGRETE (Univ. de Karako, Venezuelo) prelegis pri klasika rilato: *Logiko kaj lingvo*.

Pri la evoluo de *Esperanto-instruado en Karlskoga* vigle rakontis la sveda lingvo-didaktikisto Lars FORSMAN, sekvata de la ĉeĥa instru-teknologiisto Josef VOJÁČEK (Univ. de Brno), kiu raportis pri *Esperanto-instruado en pedagogia fakultato*. La nederlandano Ed BORSBOOM (IEI, Hago) alparolis pri la *Vivo de Andreo Cseh*.

Inter la prelegoj okazis du dekminutaj debatoj, kie la partoprenantoj intervenis per siaj demandoj kaj rimarkoj.

Posttagmeze oni plejparte spektis prezentojn de Esperanto-koncernaj teknologiaj lernosistemoj kaj de instruaj projektoj kaj spertoj.

La juna svedo Hokan LUNDBERG komputile montris la *Retprojektojn por E-lernado*, pri kiu li nun laboras kadre de E@I (Esperanto ĉe Interreto, faka sekcio de TEJO). Temas pri la lernosistemo *LERNU.net*, pri instruhelpa reta medio *EDUKADO.net* kaj pri la retpaĝaro *LINGVA PRISMO* (informa pri aliaj lingvoj).

Sonja PETROVIĆ (vicprezidantino de TEJO), prezentis la celojn kaj ecojn de la nova eldono de projekto *INTERKULTURO*, kiun oni rearanĝas kunlabore inter ILEI kaj E@I.

Sekvis la prelego de la didaktika informadikisto Radojica PETROVIĆ (Univ. de Ĉaĉak, Serbujo kaj Montenegro) pri fona temo *Esperanto kaj interkultura pedagogio*. La brita instruisto Malcolm JONES raportis pri anglalingva *Nova koresponda kurso*; Hazel GREEN el Aŭstralio, komentis pri la *Malĉeesta instruado de Esperanto* en tiu kontinento. HORI Yasuo (japana instruisto) raportis pri Asocio de Lernejoj Esperantistoj en Japanujo (*ALE*, kiun li sekretarias) kaj Atilio ORELLANA ROJAS (direktoro de la Internacia Esperanto-Instituto) informis pri la novaj *Projektoj KORE kaj NESTO*.

Konkludis la *Tagon* interveno de d-ino KOUTNY Ilona pri la ĵus aperinta trilingva lerneja terminaro.

Ĉiujn prezentojn sekvis komentaj alparoloj de la ĉeestantoj, inter kiuj emfazindas tiu de ĉina prof-ino CUI Jianhua de la Nanjing'a Univ. (Univ. de Nanjing), kiu invitis la alilandajn Esperanto-parolantajn docentojn profesie kunlabori kun la Fremdlingva Fakultato, kiun ŝi kundirektas.

Maŭro La Torre, kunordiginto de la TdL

⁶ vd. la nunan IPR-on, p. 21.!

Hokan Lundberg:

E@I – nova partnero de ILEI

Dum la someraj aranĝoj E@I oficiale fariĝis faka sekcio de TEJO kaj nova partnero de ILEI. Hu ra! Sed, kio estas tiu E@I kaj kion signifas la nova partnereco? Ĉi-artikole vi povas legi pri tio.

Internacia laborgrupo

Esperanto@Interreto (mallonge E@I, elparole “eĉei”) naskiĝis en 1999 kiam tri aktivuloj el Litovio, Rusio kaj Svedio renkontiĝis dum aranĝo por junularaj organizoj. Ili havis la taskon pripensi kunlaborojn inter organizoj de diversaj ĉe-baltmaraj landoj. Evidentiĝis ke ili ĉiuj tri volis fari ion rilate al Esperanto kaj Interreto. De kie venis la nomo “Esperanto@Interreto” ili ne memoras, sed ili tuj ŝatis la nomon kaj komencis plani por la unua E@I-seminario.

Tiu seminario okazis en Svedio kelkajn monatojn poste, kaj estis tute malprofesia el multaj vidpunktoj. Tamen, la bona etoso kaj kunlaboremo inspiris la organizantojn daŭrigi la laboron. Kiel rezulto sekvis pli kaj pli bonkvalitaj seminarioj en diversaj landoj, la lasta en Usono. Temoj de la seminarioj ĝis nun estis “Rete Kunlabori”, “Rete Lingvumi”, “Rete Informadi” kaj “Rete Lerni” kaj dum ili naskiĝis multaj ideoj, kreiĝis teamoj por diversaj projektoj kaj komenciĝis aferoj kiuj poste pluevoluis per la reto. Do, la seminarioj estas tre gravaj kaj estas unu el la tri kernaj agadoj de E@I.

La aliaj du kernaj agadoj estas krei ttt-paĝarojn kaj informi pri kiom bona paro Interreto kaj Esperanto estas por tutmonde komuniki *facile kaj rapide!* La paĝaroj de E@I kovras tutan spektron ekde ĝenerala prilingva paĝaro ĝis paĝaro por subteni Esperanto-instruantojn: **Lingva Prismo** (www.lingvo.info) – por interesigi homojn pri lingvoj ĝenerale kaj E-o aparte, **lernu!** (www.lernu.net) – por homoj kiuj volas informiĝi kaj lerni Esperanton, **Interkulturo** (www.interkulturo.net) – por lerni pri aliaj kulturoj kaj utiligi Esperanton, **tejo.org** (www.tejo.org) – la reta vizaĝo de TEJO, **Reta Informado-Centro** (www.ikso.net/ric) – por subteni E-

informantojn kaj **Edukado.net** (www.edukado.net) – por subteni E-instruantojn.

La fortoj malantaŭ E@I estas bona kombino de talentaj kunlaborantoj, financa subteno de Esperantic Studies Foundation kaj "eksteraj fondaĵoj", dura laboro kaj konstanta revado pri novaj ideoj kaj projektoj. Nunaj revecaj longdaŭraj planoj temas i.a. pri starigo de oficejo, fondo de ne-profit-cela firmao kaj okazigo de someraj E@I-universitatoj.

Se vi volas iel involviĝi en la laboro de E@I vi estas tre bonvena. Ĉiam bezonatas ekzemple tradukantoj, programistoj, aspektigistoj, seminario-kunorganizantoj, monpetverkantoj, informantoj kaj subtenantoj. Ne hezitu skribi al eĉei@ikso.net se vi volas involviĝi aŭ havas demandon, proponon aŭ simile!

Vi estas tre bonvena ankaŭ membriĝi al E@I, per sendo de malplena mesaĝo al eĉei-membroj-subscribe@yahoo.com.

Kunlaboro kun ILEI

E@I strebas ĉiam evolui antaŭen kaj fariĝi pli kaj pli profesia. Unu paŝo en tiu procezo estis fondi organizon Esperanto@Interreto kiu fariĝis faka sekcio de TEJO dum la somera komitatkunsido. Tamen, E@I daŭrigas nomi sin "laborgrupo" por substreki ke ĝi koncentriĝas je konkretaj projektoj kaj aranĝoj. La plej grandaj laborfortoj en E@I venas el Nord-Ameriko kaj Eŭropo, sed ni esperas iam havi kunlaborantojn ankaŭ en aliaj kontinentoj. Krom oficialigi sian kunlaboron kun TEJO, E@I volas profundigi sian kunlaboron kun ILEI kio espereble rezultigos pli da junaj Esperanto-instruantoj kaj pli reteman ILEI. Unu jam ekzistanta kunlaboro inter ILEI kaj E@I estas la dua fazo de la projekto Interkulturo (IK2). Pri IK2 jam estis informoj en IPR. Aliaj ideoj pri komunaj projektoj estas "Reta Oficejo" kaj "Flugiloj de malfacila vento - projekto por plivastigi kaj subteni instruadon de Esperanto inter junuloj." Se tiuj projektoj donos rezultojn, vi certe povos legi pli pri ili en venontaj numeroj de IPR. Dume, vi povas rigardi projektpriskribojn kaj skizojn de la projektoj ĉe www.ikso.net/ilei.

Hokan Lundberg (hokan@ikso.net)

novelektita estrarano de ILEI, respondeca pri retaj projektoj, junulara agado kaj informado

Ni demandis al ...

Mark Fettes

la direktoro de ESF (Fonduso por Esperantologiaj Studoj) – nuntempe la plej granda mecenato de edukaj projektoj de Esperantujo – pri la funkciado kaj politiko de la Fonduso.



(La konversaci-partnero de Mark Fettes estis Katalin Kováts)

Ĉu vi povus iom pli detale solvi por niaj legantoj la siglon: ESF?

La solvo de la literoj estas *Esperantic Studies Foundation*. La vorto "Esperantic" estis neologismo, kreita analoge al la nomoj de lingvo-familioj kiel "Turkic" (tjurka), "Semitic" (semida), ktp. "Esperantic studies" do ne signifas "studoj pri Esperanto" sed "esploroj pri tiaj lingvaj fenomenoj, de kiuj Esperanto prezentas konkretan kazon". Montriĝis malfacile difini tiun esplorkampon pli precize. Antaŭ kelkaj jaroj Jonathan Pool kaj mi ellaboris la koncepton "interlingvismo," en artikolo legebla en Esperanto ĉe www.esperantic.org/esf/ismo.htm. Mi rekomendas ĝin al tiuj, kiuj volas iom pli profunde konatiĝi kun la esplorintereso de ESF.

Kiam kaj kiucele ekestis la Fonduso?

La fondon de ESF en 1968 iniciatis Humphrey Tonkin, Jim Lieberman kaj Jonathan Pool. Iliaj motivoj estis kaj restas iom diversaj, sed ili ĉiuj konsentis, ke la manko de seriozaj esploroj pri interlingvistikaj temoj, aparte en la anglalingva mondo, malhelpas la disvolviĝon de Esperanto kaj la kreadon de raciaj solvoj al problemoj de interlingva komunikado. La ĉefa celo de ESF, do, estis stimuli kaj subteni tian esploradon.

Ĉu eblas scii kiuj agas nun „malantaŭ” ESF?

La Fonduso estas registrita privata fonduso en Usono. Ĝin administras kelkpersona estraro, kiu de tempo al tempo invitas novulon aliĝi al la

teamo. Nuntempe ni havas ses estraranojn: Humphrey Tonkin, Jonathan Pool, David Jordan, Ian Richmond, Grant Goodall, kaj min. De kelkaj jaroj, mi estas la ĉefa kunordiganto de la agadprogramo de ESF. Ĉar mi nun estas dungita kiel universitata profesoro kaj ne havas multan tempon por administrado, mi mem dungis part-tempan sekretarion, Jason Clark, por helpi prizorgi kontadon, dokumentadon, nian bultenon kaj retpaĝaron, ktp.

Konante la agadteron de ESF estas neeble – ĉu malĝentile? – ne demandi kiel oni povas kovri tiajn elspezojn?

Dum siaj unuaj tri jardekoj ESF disponis nur pri kelkaj centmiloj da dolaroj, kaj do ĝiaj agadeblecoj estis tre limigitaj. Tio ŝanĝiĝis en la jaro 1999, kiam Cathy Shulze, la karmemora iniciatinto de la somera Esperanto-kursaro en Sanfrancisko, testamentis al ni preskaŭ tri milionojn da dolaroj. Parto de tiu sumo estas rezervita por subteni la daŭran okazigon kaj disvolvado de la kursaro, kiun nun gastigas la Altlernejo por Internacia Trejnado en Vermonto. La resto estas uzebla por antaŭenigi la ĝeneralajn celojn de ESF.

Ŝajnas al mi, ke la nun subtenataj projektoj pli rilatas al la praktika uzo kaj pedagogia kampo de Esperanto ol al sciencaj esploroj. Kiel vi klarigas la forlason de la originala celaro de la fondintoj?

La esperoj de la fondintoj de ESF, stimuli seriozan esplorado pri interlingvaj fenomenoj kaj speciale pri Esperanto, ankoraŭ ne multe realiĝis. Ĉiujare ni ricevas diversajn proponojn de sciencaj esploroj diversspecaj, sed ili malofte rilatas al la demandoj, kiujn ni konsideras prioritataj. Parte pro tio, kaj parte reage al la emfazo kiun Cathy Schulze metis sur la instruado de Esperanto, ni turnis nian atenton pli kaj pli al edukadaj projektoj, en kiuj Esperanto ludas kernan rolon. Ni subtenis la projekton Indiĝenaj Dialogoj per \$30.000; ni financis la lastajn stadiojn de la vidbenda serio "Pasporto al la Tuta Mondo"; ni iniciatis kaj financis la retprojektojn www.edukado.net kaj www.lernu.net; lastatempe ni subvenciiis la revivigon de la projekto "Interkulturo". Nia ĉefa emfazo en ĉio ĉi estas la subtenado de novaj instrumentoj, novaj formoj de kunlaboro, kaj novaj manieroj uzi Esperanton por pli vastaj edukaj celoj.

La tuta movado, ties eduka sfero, kaj precipe ILEI devus esti tre dankema, ke ESF ne lasis perdiĝi bonajn ideojn kaj la ĉirkaŭ tiuj

varbiĝantajn teamojn, sed malavare, tamen kun pretendo de alta kvalito kaj bona laboro, ebligis la financan – ofte la plej mankantan – bazon por la realigoj de tiuj projektoj. Ĉu tiel estos ankaŭ en la estonteco?

Ne vere. Oni devas konsideri ĉi tiun fokuson nur provizora. La ESF-estraro ne rezignis pri la originaj celoj de la Fonduso, kaj estas tute imageble, ke post kelkaj jaroj la plej granda parto de nia agado rilatos al esplorado kaj ne al praktikaj edukadaj projektoj. Nur la somera kursaro nepre restos. Jam sur la tereno de interlingvistiko ni subtenis plurajn konferencojn, eldonaĵojn, kaj malgrandajn esplorprojektojn. Nuntempe ni subvencias la pretigon de konserva kaj uzebla plano por Biblioteko Hector Hodler ĉe UEA, kaj la kunmetadon de fidinda plurmilionvorta Esperanto-tekstaro por esploraj celoj. Sed tiuj estas tre modestaj iniciatoj, kompare kun la bezonoj sur tiu tereno.

Al kiu turnu sin tiuj kolegoj kiuj havas novan ideon, por kies realigo necesas subteno? Kiel oni trovas ESF, ja krom legi pli kaj pli ofte pri ĝi kiel pri subtenanto, ne vere svarmas reklamoj pri la fonduso?

Ni konscie evitis disreklami nian agadon en la E-komunumo, ĉar tio riskas identigi la Fonduson kiel movadan organizaĵon kaj inviti aron da proponoj kaj petoj, senrilataj al niaj celoj. Ni tamen bonvenigas kontaktojn kun tiuj homoj, kiuj volas (kaj kapablas) profesinivele okupiĝi pri Esperanto en esplora aŭ eduka kadro, tiel ke ankaŭ neesperantista faka publiko havu intereson pri la rezultoj. Anstataŭ la sendado de kompletaj projekt-proponoj, ni instigas interesitojn sendi al ni koncizan leteron en kiu ili prezentas sin mem kaj resumas siajn ideojn. Esperantlingvaj gvidlinioj por tio baldaŭ aperos en niaj retpaĝoj ĉe www.esperantic.org.

Korespondaĵojn oni sendu al mi ĉe: Dr. Mark Fettes, Faculty of Education, Simon Fraser University 8888 University Drive, Burnaby, BC, Kanado V5A 1S6 ✉: mfettes@esperantic.org

El la nomo de ĉiuj esperantistoj kiuj iel ajn riĉigis kaj riĉiĝos pere de la projektoj, subtenitaj de ESF mi tutkore dankas al la estraro ties zorgadon kaj apogon.

Fine lasu al ni esperi, ke dum iom da tempo – ĝis ekestos alia, solida faka fono por la pedagogiaj agadoj - la praktika kampo de instruado kaj lernado povos resti en la vidkampo de ESF.

(K.K.)

Stefan MacGill:

Someraj sonoj ĉe norda lago



(Infana Kongreseto 2003)

La sonoj de naĝado kaj akvoludoj ŝvebis ĉiutage super la lago. Krioj el arbaro: “Mi trovis jam kvin!” Eĥo: “Eĉ unu suĉ-bombonon mi ne trovis... kie.. ha jen unu!”. Internacia Futbala Ĉampionaĵo kun komentario: “Tomoya lerte preterpasas du atakantojn, plue al Florian, Gretel klopodas haltigi lin, sed ŝoto al golo... Kristine haltigas tion per forta piedbato - tute ĝis la alia golo!”

Jen sonbildo de la 35a Internacia Infana Kongreseto okazinta fine de julio en Lerum, 20 km de Gotenburgo. Ĝi arigis 27 infanojn el ok landoj (Belgio, Francio,

Hungario, Japanio, Kubo, Norvegio, Rumanio kaj Svedio), la plimulto knabinoj. Alta proporcio venis el E-familioj kun bona lingvoscio; tamen kvarono havis malpli da kapablo ol la kongreseto vere bezonas; tiuj partoprenis ĉiutagan paroligan kurson.

Kelkaj gepatroj kaj aliaj familioj kun infanoj aldoniĝis al nia ekskurso al la bonega bestoĝardeno en Borås. En alia tago, gepatroj, ĵurnalisto kaj interesitoj vizitis la IIK-ejon kaj la infanoj pretigis koncerteton por ili. Popularaj programeroj estis pentrado, desegnado, kolĉena farado, sportaj olimpikoj kun premioj [vd. *foton!*], apudlaga fajro, du trezor-serĉoj, muzikado kaj dancado, seĝo-ludoj kaj la ĉiunokta endormiga rakonto, per kiu la infanoj aŭskultis tutan libron: “Avinjo”. La tuton ne eblas rakonti ĉi tie. Vizitu la hejmpaĝon de IIK por legi raportojn verkitaj de la infanoj kaj vidi fotojn. Iru al la hejmpaĝaro de UEA kaj serĉu sub ‘Kongresoj’.

Ni kore dankas al Aino, nia surloka gvidanto, kiu glatigis por ni ĉion, kaj al la aliaj gvidantoj kaj helpantoj.

Stefan MacGill

La nova estraro de ILEI:



La reelektitoj: Stefan MacGill, Boo Mee Kim-Lindblom, Maŭro La Torre, Radojica Petroviĉ (foto de Simon Smits)

Radojica Petroviĉ:

Naskiĝis en 1949 kaj esperantistiĝis en 1967. Loĝas en Ĉaĉak, Serbio. Edukiĝis pri matematiko kaj informadiko, magistriĝis pri aktuaria matematiko. Estis mezlerneja instruisto pri matematiko, aktuario en asekura kompanio, programisto, estro de komputilcentro. Nun estas universitata instruisto pri datumbazoj kaj komputika instrumentodiko. Aŭtoras artikolojn kaj prelegojn en la serba kaj la angla lingvoj kaj en Esperanto pri informadiko, asekurado, kvalitsistemo, komputika pedagogio, kaj interkultura edukado per Esperanto. Publikigis infan-gazetan E-kurson, beletrajn tradukojn el kaj al Esperanto, recenzojn kaj originalajn E-versaĵojn por infanoj.

Instruis Esperanton en lernejoj kaj eksterlernejoj kaj E-metodikon en seminarioj por E-instruantoj. Organizis internaciajn E-renkontiĝojn kaj seminariojn, aplikigis la projekton Interkulturo en Serbio kaj kunordigas ĝian refunkciigon en nova eldono. Estis prezidanto de Serbio kaj Jugoslavia Esperanto-Ligoj kaj LKK-ano de UK. Estas estro de Sekcio pri instruado de Esperanto-Instituto Beograd, A-komitatano de UEA, membro de ILEI ekde 1991 kaj estrarano ekde 2001.

Celoj en ILEI: malfermiĝo de ILEI al pli vasta medio de edukado kaj kulturkreado kaj kunlaboriĝo kun internaciaj kaj naciaj institucioj kaj fondaĵoj en tiuj fakoj; **organiza fortiĝo** de ILEI, plimultigo kaj plijunigo de la membraro kun aparta zorgo pri instrukapabligo kaj aliaj profesiaj bezonoj de E-instruistoj; **la projekto Interkulturo** – plua evoluo, popularigado kaj uzado.

Stefan MacGill:

Naskiĝis en Lower Hutt, Nov-Zelando en 1948. Denaska esp-isto. Kunfondinto de Esperanta Junulara Asocio de Nov-Zelando (1964) kaj aktivulo tie ĝis 1972. Studis en Universitatoj Victoria, Canterbury kaj Massey (69-75), ĉefe geografion. Diplomiĝis kiel instruisto por elementaj lernejoj en 1974.

Volontulo (la dua en la programo) en la CO de UEA (1976), oficisto (1977-86). Redaktoro/kunordiganto de Jarlibro (76-86), teknika redaktoro de Kontakto (78-86). Vicprez de TEJO (77-79), prez. (1979-80). Direktoro de CO (1980-84). Redaktoro de Juna amiko (1986-96). Vicprez. de ILEI (1989-92), prezidanto (1992-94). Restariginto de la ekzamenoj UEA/ILEI kaj ĝia sekretario (1989-95). Profesie ekde 1989 verkas manlibrojn kaj help-tekstojn por komputilaj programoj (optika karaktro-rekono). Esploras lingvodidaktikon kaj preparas Esperantajn instru-materialojn. Interesiĝas pri transporto; precipe fervojoj kaj iliaj horaroj.

Vivas en Hungario de post 1986. Havas tri filinojn, Karina (1990) Hajnal (1992), Sonja (2000) ĉiuj tri estas denaskaj esp-istoj.

Verkis pli ol 20 eldonaĵojn, plejparte en Esperanto.

Maŭro La Torre:

Naskita en Romo (Italujo) en 1946, esperantistiĝis en 1962.

Doktoriĝis pri matematiko en 1974 kun disertaĵo pri matematika lingviko.

Ekde 1974-a dum 15 jaroj instruis en bazlernejoj, samtempe laborante por instruista trejnado, kunlabore kun itala instruista asocio CIDI.

Ekde 1987 laboras en la Klerigscienca Departamento de la Tria Roma Universitato, pri aŭtomatigo en ekzamenado, instru-teknologioj, teleinstruado, komputiko, lingva statistiko, terminologio, lingvopolitiko. En tiuj kampoj publikigis plurajn verkojn.

Nuntempe profesoro pri Eksperimenta Pedagogio, instruas al Klerig-sciencaj studentoj Lernotaksikon, Komputikon kaj Logikon. En la esperantologia kampo, kunlaboris en la terminara komisiono de IAdEM, verkis iujn lernolibrojn kaj artikolojn precipe pri vortaraj kaj terminaj problemoj.

Redaktis lingvopolitikan rubrikon (Barbarismi) en instruika fakrevuo Cadmo, respondecis pri la lerneja instru-eksperimento ESP² koncerne influon de E-lernado al la lingvo-konscia kapablaro, kaj projektis LIL (Lingva Interreta Laborejo), por la trejnado de lingvoinstruistoj. Kadre de ILEI kaj UEA, lanĉis la internacian inter-lernejan edukprojekton Interkulturo.

Boo Mee Kim-Lindblom:

Estas naskita en la jaro 1941 en Koreio. Post universitata studado pri koreaj lingvoj kaj literaturo fariĝis instruisto en mezlernejo en 1962. En 1964 esperantistiĝis kaj fondis rondon Stelaro, kiu bone aktivis en Seulo. Fariĝis E-instruisto (1966) kaj gvidis E-kurson en Y.M.C.A. kaj ankaŭ por lernantoj inter 13-15 jaraj. Estis sekretario de Korea E-Instituto (1967-72). Studis pri koreaj lingvo kaj literaturo, pedagogio kaj ricevis rajton kiel gimnazia instruisto (1978-80). Poste esploris en sama fako kaj fariĝis magistro en Yonse Univ. en Koreio. Postan jaron studis librotenanadon en New Brunswick Comm. College en Kanado (1983). Daŭre studis librotenanadon en Stokholmo en Svedio (1987). De 1986 ĝis nun instruas en baza lernejo kaj gimnazio. En Stokholma universitato studis pri interlingvistiko. Estrarano de SEF (1998). Ricevis diplomojn kiel instruisto de paperfaldado por komencantoj (1997) kaj por progresantoj (1998).

Atilio Orellana Rojas:



Naskiĝis en 1963 en Argentino, sed de 1997 loĝas en Nederlando. Eklernis Esperanton en 1984. Studis en Argentino Filologion pri Klasikaj Lingvoj. Studis la rusan lingvon kaj instruis ĝin kelkajn jarojn en la Instituto "Aleksandr Pushkin" en Córdoba; ankaŭ laboris kiel interpretisto de la rusa dum 2 jaroj. De 1988 instruas Esperanton laŭ rekta metodo kaj jam gvidis kursojn en pli ol 60 landoj en la tuta mondo. Nuntempe laboras kiel Direktoro de la Internacia Esperanto-Instituto, prizorganta la edukadon de novaj Esperanto-instruistoj. Multe verkis en Esperanto kaj la hispana pri indiĝenaj temoj, speciale pri lingvistikaj aspektoj, muziko kaj religio por specialigitaj revuoj kaj por la Esperantogazetaro. Plenumis diversajn postenojn en la E-medio: Prezidanto de Argentina E-Asocio (1989-1991); C-Komitatano de TEJO (1992-1994) UEA-Komisiito por Ameriko (1994-2002); UEA-Komitatano A (1996-1998) kaj B (1999-2001), (2001-2003). Estrarano de ILEI (1995-1999), Komitatano

de ILEI (1999-2001), (2001-2003); Prezidanto de la Internacia Ekzamena Komisiono de UEA/ILEI (1997-2000); Membro de la Internacia Rajtigita Ekzamenantaro (2000-2003). Ekde 2003 estas la UEA-Komisiito pri Agado Espero. Kunlaboris kun la organizo Indiĝenaj Dialogoj ekde ĝis naskiĝo en 1998 prizorgante la taskon de instruado al hispanlingvanoj, fonetika ekzercado kaj laste kiel konsilanto kaj helpanto en la redakta teamo de ĝia reta bulleto "Tamtamo". Parolas la anglan, Esperantan, francan, germanan, hispanan, keĉuan, nederlandan, portugalajn kaj rusan.

Hokan Lundberg

Naskiĝis en Svedio 1972, ekde 2003 loĝas en Serbio kune kun la TEJO-aktivulo Sonja Petrović. Edukiĝis kiel programisto kaj gimnazia instruisto pri komputiko kaj matematiko. Laboris kiel programisto dum kvin jaroj. Ekde 2002 plentempe okupiĝas pri Esperanto-projektoj. Kunfondis la laborgrupon Esperanto@Interreto kaj kunordigis plurajn E@I-trejn-seminariojn. Programas kaj verkas por la reta lernomedio *lernu!* – www.lernu.net, ankaŭ helpas pri la paĝaroj www.lingvo.info kaj www.interkulturo.net.



Aleksandr Blinov



34 jara rusiano, loĝanta en Cheboksary, Chuvasha Respubliko, Rusio. Finis pedagogian altlernejon en 1993 pri la fakoj franca lingvo kaj psikologio. Dum tri jaroj post la finstudo laboris en mezlernejo, poste preskaŭ 10 jarojn en internacia turismo. Lia diplumlaboro estis ligita al Esperanto: "Intensaj metodoj de instruado de lingvoj (surbaze de la lingvo Esperanto)". Relative multe instruis Esperanton, estante jam studento. La metodo kiun li uzis estis ĉefe bazita sur principoj de Lozanov kaj

ties rusiaj adeptoj Kitajgorodskaja kaj Ŝehter. Aktive partoprenis en la movadaj agadoj, precipe en la rusia, estante unu el ĉeforganizantoj de pluraj aranĝoj tra Rusio. Estis unu el iniciantoj de Lingva Festivalo en Cheboksary. Dum preskaŭ kvar monatoj (1999) volontulis en Roterdamo por TEJO.



Partoprenantoj de Int. Infana Kongreso 2003 (foto de smg)

Kial oni devus lerni Esperanton?

Ronald J. Glossop, Sankta-Luiso, Mizurio, Usono

Prelego dum Tago de Lernejo, Universala Kongreso, Gotenburgo, Svedio, 29 julio 2003

„Kial oni devus lerni Esperanton?” Bedaŭrinde, estas multaj homoj, speciale en anglaparolantaj landoj kiel Usono, kiuj ne demandis pri tio, ĉar ili neniam eĉ aŭdis la vorton „Esperanto”. Tamen tio estas demando, kiun ĉiu esperantisto devus esti preta senhezite respondi.

Kompreneble, la respondo ne estas la sama por ĉiu persono. Plue estas diversaj specoj de kialoj. Mi volas diskuti kun vi kelkajn el ili en tri kategorioj. Tiuj tri specoj de kialoj estas (1) la praktikaj kialoj, (2) la mens-pligrandigaj kialoj, kaj (3) la moralaj kialoj.

La unua praktika kialo, kiun mi volas menciigi, estas por amuzi vin. Per Esperanto vi povas renkonti kaj konatiĝi kun multaj bonkoraj interesaj kleraj lertaj talentaj personoj, vojaĝi al diversaj landoj tra la tuta mondo,

ĝui vere internaciajn festojn, kaj aŭskulti muzikon kaj danci dancojn de multaj kulturoj. La tuta planedo povas iĝi via ludejo.

La dua praktika kialo estas por havi konatajn (kaj eĉ ĝis nun nekonatajn) samideanajn amikojn, kiuj salutos kaj bonvenigos vin ie ajn en la mondo. Kelkfoje ili eĉ invitos vin manĝi kaj resti en siaj domoj en foraj landoj. Kiel esperantistoj ofte diras: „Se vi volus gajni monon, studu la anglan; se vi volus havi amikojn, lernu Esperanton”. Sendube estas vera aforismo, ke esperantistoj havas bonajn amikojn ĉie. Preter tio, ne forgesu, ke kelkfoje esperantistoj eĉ trovas edzon aŭ edzinon.

La tria praktika kialo lerni Esperanton, speciale por infanoj en anglaparolantaj kaj aziaj landoj, estas, ke Esperanto provizas bonan manieron komenci la studon de alia lingvo krom la denaska lingvo. Diversaj eksperimentoj montras, ke lernantoj povas pli rapide lerni la laŭregulan lingvon Esperanto ol eŭropajn naciajn lingvojn kiel la anglan kaj la francan. Plue oni povas observi, ke lernantoj, kiuj unue studas Esperanton anstataŭ studi pli malfacilajn lingvojn, poste pli avide lernas aliajn lingvojn. Ili sentas, ke ili havas la kapablon fari tion. Male, la studado de pli malfacilaj lingvoj kiel la latina kaj la angla ofte malkuriĝigas la lernantojn provi lerni aliajn lingvojn.

Nun mi turniĝu al la dua speco de kialo studi Esperanton, nome, por pligrandigi vian menson per pli bona kompreno de la mondo. Kiel bone diras kanada esperantisto D-ro Stevens Norvell el Nov-Skotio, Esperanto estas „fenestro al la mondo”. Kiam oni kapablas legi kaj aŭdi nian lingvon, oni povas informiĝi pri aliaj landoj, aliaj kulturoj, kaj aliaj vidpunktoj per libroj, ĵurnaloj, revuoj, sonbendoj, vidbendoj, radiaj kaj televidaj elsendoj, retejoj, kaj ret-mesaĝoj. Oni povas informiĝi el neŭtrala vidpunkto pri kio okazas tra la tuta mondo.

Plue ne estas nur specifaj informoj, kiujn vi povas ekscii. Oni gajnas ankaŭ pli bonan mondkoncepton ĝenerale. Oni ne plu estos tiel ligita per lingvo al malgranda parto de la Tero kaj la vidpunktoj de tiu lingva aŭ kultura komunumo. Oni konatiĝas kun la tuta homa komunumo.

La tria speco de kialo lerni Esperanton estas por mi persone la plej grava. Ĝi estas la morala kialo, kaj ĝi havas du flankojn: Unue, oni povas havi rilaton kun aliaj personoj tra la tuta mondo sur bazo de egaleco kaj justeco ĉar oni uzas tutteran neŭtralan lingvon anstataŭ uzi la propran nacian lingvon. Vi ne postulos ke aliuloj uzu vian lingvon, kaj

ili ne postulos, ke vi uzu ilian lingvon. Sekve ekzistas sento de egaleco kaj justeco inter vi kaj aliuloj.

La dua aspekto de la morala speco de kialo lerni Esperanton estas la fakto, ke, kiel esperantisto, oni helpas krei evoluantan harmonian tutmondan komunumon. Per Esperanto oni iĝas parto de tre grava historia movado, kiu antaŭenigas la solidarecon inter ĉiuj homoj. Esperanto ne estas nur lingvo. Ni esperantistoj estas tute nova speco de universala komunumo bazita sur la uzo de nia tutmonda lingvo. Ni nun kune moviĝas preter la internaciismo de la dudeka jarcento al la tutmondismo de la dudek-unua jarcento. Tamen ni samtempe helpas konservi la diversajn naciajn lingvojn en la diversaj mondpartoj.

Sendube estas aliaj kialoj lerni Esperanton, kiujn mi ne menciis. La situacioj kaj motivoj de homoj estas tre diversaj. Tamen mi esperas, ke la ideoj, kiujn mi prezentis ĉi tie, helpos vin persvadi aliulojn, ke ili devus lerni Esperanton kaj aliĝi al nia evoluanta tutmonda komunumo.

Magali von Blottnitz:

Sudafrikanoj prezentis E-on dum mondkonferenco de lingvoinstruistoj

La unua semajno de julio estis grava semajno por lingvorilataj profesiuloj en Sudafriko. La monda kongreso de FIPLV (Fédération Internationale des Professeurs de Langues Vivantes, aŭ Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj) okazis en Johanesburgo, kaj samtempe jarkongresis la sudafrika asocio de lingvistoj, SAALT.

Sudafrikaj esperantistoj povis partopreni tiujn eventojn. Danke al la frua atentigo de Jennifer Bishop ni povis uzi la okazon por multflanka varbagado, en kunlaboro kun aliaj organizaĵoj de la E-movado, ĉefe ILEI kaj Indiĝenaj Dialogoj. La agadon kunfinancis EASA (Esperanto Asocio de Suda Afriko), ILEI/Interkulturo kaj kelkaj subtenantoj el Aŭstralio.

1. Tre bonaj rilatoj kun FIPLV


Axel von Blottnitz, komitatano de EASA kaj eksa prezidanto de la (nun mortinta) sudafrika sekcio de ILEI, partoprenis en la monda asembleo de FIPLV, la 1-an de julio. Li estis tre impresita pri la bona statuso de ILEI

ĉe FIPLV kaj la favora sinteno ĉefe de ties prezidanto Denis Cunningham (kiu jam partoprenis iun UK en Aŭstralio).

2. Prelegoj

Du prelegoj estis prezentitaj kun rilato al Esperanto, ambaŭ dum la unua mateno de la konferenco. Magali von Blotnitz prelegis pri Esperanto kiel vojo al multlingveco, kaj Jan vd Strydom legis artikolon de Radojica Petroviĉ: "On a web based project of language learning and intercultural education" (Pri retprojekto de lingvolernado kaj interkultura edukado). Temas pri la projekto de ILEI: Interkulturo, kiu uzas ankaŭ servojn de la projektoj de ESF: "lernu!" kaj "Edukado.net". Bedaŭrinde pro granda kvanto da samtempaj prelegoj ĉeestis nur 22 homoj, kiuj ĉe la fino ricevis kopiojn de la teksto. Ni disdonis kelkdek kopiojn de la prelegoj ankaŭ al kongresanoj, kiuj ne aŭdis la prelegon.

Cetere, kvankam entute la prelegoj rekte tuŝis malmultajn homojn, la resumoj estis disdonitaj al ĉiuj konferencanoj kaj la organizantoj planas produkti konferencan KD-on kun ĉiuj prelegoj, tiel ke eĉ la detalaj tekstoj disdoniĝos al ĉiuj.



Magali, Maiwenn, Clement kaj Axel ĉe la ekspozicio [vd. p. 25.]

3. Ekspozicio

Ni prezentis afiŝan ekspozicion pri la projekto "Indiĝenaj Dialogoj"⁷ kaj ni table ekspoziciis kelkajn montraĵojn pri esperanto, ĉefe librojn kaj vortarojn, revuojn, komiksojn, KDjn. Kvin esperantistoj (el diversaj aĝ-, seks- kaj rasoj) deĵoris laŭtempe ĉe la ekspozicio – aldonendas okmonata bebo Maiwenn von Blotnitz kiu ricevis multajn komplimentojn de la kongresanoj ☺... Bedaŭrinde, venis malmultaj reagoj/komentoj pri la ekspozicio.

La ĉefa rezulto de la ekspozicio certe estis montrado, ke Esperanto ekzistas, kaj disdono de informiloj. Iu viro (sudafrika artisto/ poeto) mendis Angla-Esperantan vortaron. Surprizige, iu persono (mi ne havis tempon noti la nomon) venis saluti min nome de Humphrey Tonkin (!). Kelkaj pliaj homoj lasis siajn adresojn en nia kontaktolibro.

4. Interago kun aliaj ĉeestantoj / profesiuloj pri lingvoj

La tri tagoj donis al ni iom da tempo por intermiksiĝi kun aliaj profesiuloj pri lingvoj, kaj fari interesajn renkontojn. (Bedaŭrinde pro kostoj, distancoj kaj familiaj devoj, ni ne povis partopreni la vesperajn aranĝojn). Ĉefe interesaj estis la jenaj kontaktoj:

Politikaj deciduloj: Plej sukcesaj estis kontaktoj kun "Okcidentkaba lingva komitato" (Western Cape Language Committee), parto de la provinca registaro de la okcidenta Kabo. La Lingvokomitato agas por multlingveco en la Provinco (ĉefe rilatite al la 3 oficialaj lingvoj de la provinco, nome angla, afrikansa kaj ksosa). Ili volas krei agadgrupon por multlingveco kaj ni provos aliĝi al tiu agadgrupo.

Lingvistoj kaj akademiuloj: Kelkaj akademiuloj montris sin sufiĉe malfermataj al Esperanto – unuavice la organizantoj ĉe la Rand Afrikansa Universitato, kaj la estro de la sesio dum kiu prelegis Magali, S-ro Viljoen ĉe Pretoria teknika universitato. Ambaŭ institutoj akceptis disdoni stoketon da niaj novaj faldfolioj al studentoj post fino de la ferioj. Ni faris kontaktojn ankaŭ ĉe aliaj universitatoj. Tiuj kontaktoj espereble estos utilaj se ni iam volos kaj povos starigi kursojn aŭ varb-agadojn ĉe studentoj.


⁷ Temas pri projekto kiu kunigas homojn el endanĝeritaj minoritatoj de diversaj kontinentoj kaj uzas esperanton kaj interreton por krei dialogon inter la popoloj.

5. Reklamo en konferenclibro

Ni aperigis tutpaĝan reklamon pri Esperanto en la konferenclibro, kiun ricevis ĉiuj delegitoj. Ni por la okazo urĝe produktis kvinlingvan reklamon (angla-afrikansa-franca-zulua-rusa). Bedaŭrinde la kirilaj literoj de la rusa teksto ne printiĝis, sed anstataŭe aperis nigra linio en la libro. Tamen, bonŝance la reklamo aperis sur la lasta paĝo de la libro, do supezeble estis videbla de preskaŭ ĉiuj.

Konklude, tiu kongreso donis al ni bonan okazon por montri la ekziston de Esperanto. Eĉ se malmultaj konferencanoj vere profitis de la detala kaj multa laboro farita, almenaŭ ni faris sufiĉe profesiecan impreson kaj oni povas esperi ke neniuj foriris de la konferenco sen esti leginta almenaŭ 3-4 foje la vorton «Esperanto». Nun restas la tasko prizorgi la faritajn kontaktojn! Ni ankoraŭfoje dankas al ĉiuj kiuj ebligis tiun agadon.

*Magali von Blottnitz, Sekretario de Esperanto Asocio de Suda Afriko,
6, Dulwich Green Boundary Road Newlands 7700 South Africa,
<hvb@mweb.co.za>*



Partoprenantoj de ILEI/TEJO-seminario en Svedio

La projekto Interkulturo ĉe internaciaj konferencoj

Unesko:

Prezento de Interkulturo verkita de Radojica Petroviĉ kaj Maŭro La Torre aperas en la kompaktdiska prelegaro, ISBN 951-39-1531-X, de la Konferenco de Unesko pri interkultura edukado okazinta la 15-18-an de junio 2003 en Jyväskylä, Finnlando, kun proksimume 600 partoprenantoj kaj 20 paralelaj sesioj ĉiutage. Ĉirkaŭ 20 personoj partoprenis la konferencan sesion dum kiu Radojica prezentis Interkulturon. Tio estis kutima kvanto, kaj la intereso estis granda. Aliaj interrete agantaj interkulturistoj esprimis similajn problemojn kiajn Interkulturo renkontas, malfacilaĵojn pri la daŭra plutenado de la diversaj kontaktoj, miskomprenoj inter agantoj en diversaj landoj, mezurado de rezultoj k.s. Interkulturo ofertis interesajn metodajn solvojn kaj certe povos utiligi metodojn jam ellaboritajn de aliaj. Formiĝis utilaj kontaktoj. La fakto, ke Esperanto estas uzata en Interkulturo, ne alvokis apartan miron. Tio prezentiĝis kiel grava parto de la koncepto, tute nature. La problemoj de lingvoelekto kaj domino de la angla estis menciita ankaŭ de aliaj prelegantoj.

laŭ raporto de la partopreninto Anna Margareta Ritamäki, retlisto BJA



*ILEI-konferencanoj rigardas prezentadon de infana grupo en la manĝejo
(foto de Sylvia Hämäläinen)*

Socrates/Comenius:

E-istoj Laura Brazzabeni kaj Radojica Petroviĉ patroprenis internacian konferencon pri edukado al diverseco kaj civitaneco kaj Comenius-kontakt-seminarion (<http://www.acodden.org/info/index17m.html>) okazintaj la 3-5-an de julio 2003 en Montecatini, Italio, organizite de ACODDEN (A Classroom of Difference – Diversity Education Network, Klasĉambro de Diferenco – Reto por Edukado al Diverseco) kun subteno de Eŭrop-Unia programo *Socrates*. La projekto Interkulturo de ILEI kaj E@I estis prezentita kiel ekzemplo de Interreta projekto por interkultura edukado. Ĝi vekis apartan intereson per sia interaktiveco, aktivigo de la lernantoj kaj atento pri trejnado de interkulturedukantoj. En posta diskuto en la kontaktseminario montriĝis, ke la problemoj de interkultura kompetento kaj trejniĝo de la edukantoj estas kerna en la interkultura edukado. Kiel rezulto sekvis partnera propono pri tiutema projekto de partoprenantoj el kelkaj institucioj de diversaj Eŭropaj landoj, inkluzive ILEI. Indas instigi plutrakton de la propono en la kadro de Eŭropa programo *Comenius 2.1*. Ankaŭ aliaj projektoj inspiritaj de Interkulturo estas proponablaj kaj partneroj por ili troveblas en la kadro de programoj *Socrates/Comenius*.

(R. Petroviĉ)

el la landoj kaj sekcioj...

Brazilo

ILEI-kunvenoj ĉiun trian monaton

La kunvenoj de ILEI-BR fariĝis trimonataj kaj ilin partoprenas ĉiam pli kaj pli da E-instruistoj. De la lasta [junio 2003 – *NdlR*] oni aldonas al ĝi kolokvon aŭ seminarion invitantaj eminentajn fakulojn, tiel ke la kunveno de ILEI-BR fariĝis tuttaga evento. Por la venonta oni realigos ankaŭ paralelajn programojn, kiel fulmo-kurso por familianoj de E-instruistoj kaj E-ludoj por infanoj. La lasta, kies gasto estis D-ro Adonis Saliba, estis la unua en la E-historio trasendita al eksterlando pere de la interreto, atinginte plurajn landojn kun aŭskultantoj kaj partoprenantoj, kiuj faris demandojn en rektaj retaj kontaktoj. Nuntempe oni laboras naciskale por ke la ILEI-afero fariĝu vera fermento, la E-instruado multobliĝu, kaj ke (re)establiĝu pluraj servoj de ILEI en Brazilo.

laŭ mesaĝo de Marcos Zlotovich al Renato Corsetti el [e-ins]

Japanio

NdlR: Japana sekcio de ILEI havas novan estrinon, ISIKAWA Tiekio (<isksanjo@ff.e-mansion.com>). Ŝi naskiĝis en 1951 kaj eklernis E-on en 1970. Ŝi estas membro de ALE (Asocio de Lernejoj Esperantistoj), instruis E-on en kelkaj lernejoj kaj gvidas mezan klason de Nishinippori E-Klubo en Tokio. Nun sekvu ŝia unua kontribuo al nia rubriko:

E-instruado en supermezlernejoj

Dum la lastaj kelkaj jaroj kiam aperis preskaŭ nenia novaĵo el Japanio en eduka kampo, okazis tamen diversaj ŝanĝoj. La plej granda kaj samtempe grava estas ke E-o estas instruata kiel oficiala lernobjekto en du supermezlernejoj (lernejo por 15-18 jaraj lernantoj). En tiuj lernejoj E-o estas traktata kiel unu el fakultivaj lernobjektoj, kaj ĉirkaŭ 20-30 lernantoj ĉiujare elektas E-on. En la venonta lernoĵaro (en Japanio nova lernoĵaro komenciĝas en aprilo), nova klaso estas planata en la urbo Osaka.

Sub la nova edukprogramo gvidata leĝe de la Ministerio pri Edukaj kaj Sciencaj Aferoj, "integrita aŭ temo-bazita lernado"⁸ komenciĝis antaŭ tri jaroj. Tiu ĉi nova programo estis lanĉita kiel antitezo de trotakso al scioj nur por ekzamenoj kaj celas sen notoj helpi lernantojn gajni kaj fortigi sian forton por vivi pere de diversaj travivaĵoj. Ĉar tiu ĉi nova programo estas enkondukita ankaŭ al elementa kaj meza lernejoj respektive, ŝancoj instrui E-on vastiĝas.

E-instruistoj/instruantoj donis al lernantoj ŝancojn scii pri E-o kaj aperis kelkaj raportoj tie kaj ĉi tie. Tian ŝanĝon ni ne povis imagi antaŭe.

ISIKAWA Tiekio, <isksanjo@ff.e-mansion.com>

Koreio

Esperanto en Universitato Wonkwang

En Koreio ĝis nun la Universitato Dankook estis la nura, en kiu E-o estis instruata oficiale kiel lernobjekto kun poentoj. Nun ankaŭ la Universitato Wonkwang enkondukis E-on kiel oficialan lernobjekton. La lecionoj

⁸ S-ro HORI Yasuo, kiu ofte partoprenis UK-ojn kaj disdonis raporton pri japana edukosituacio okaze de "la Tago de Lernejo", uzas la vorton "sin-teza lernado". Tiuj ĉi du vortoj signifas saman aferon, tamen fiksitaj kaj taŭga esprimo ankoraŭ ne estas decidita. Eĉ la Ministerio ne uzas fiksitajn vortojn en la angla.

komenciĝis ekde la septembra semestro. Ilin gvidas docento Lee Jung-kee. Universitato Wonkwang estis fondita surbaze de la religio ŝonbulismo en Koreio. Gratulmesaĝoj estas bonvenigataj ĉe: *esperant@unitel.co.kr*
Lee Jung-kee, <esperant@unitel.co.kr>

Kostariko

E-kurso en Universitato

Ekde marto 2003 dekdu enskribiĝintoj partoprenis la E-kursojn de s-ro Hugo Mora Poltronieri, en la Fako pri Filologio, Lingvistiko kaj Literaturo de la Universitato de Kosta-Riko. Temas pri elektelebla studobjekto, trihora seĝmane, valida por ĉiuj karieroj.

Salutkartoj estas bonvenaj: *Curso de Esperanto, Prof. Hugo Mora Poltronieri, Escuela de Filología, Lingüística y Literatura Facultad de Letras Universidad de Costa Rica San Pedro, Montes de Oca, San José, COSTA RICA*

Kroatio

20 kursoj pasintjare

Dum studjaro 2002/2003 en Kroatio estis gvidataj 20 kursoj el kiuj pluraj en lernejoj. Krom tio de pasinta jaro ni organizas konkurson pri scio de E-o por lernantoj el elementaj lernejoj. (En Kroatio elementa lernejo daŭras 8, kaj meza lernejo 3 aŭ 4 jarojn.)

En Kroataj kluboj kaj lernejoj gvidataj estis la jenaj kursoj:

En Varaĵdin S-ino Janja Kelava gvidis kurson en elementa lernejo kaj alian en lernanta domo. Prof. Sinisha Horvat gvidis kurson por 4 gimnazianoj.

En Zagrebo en elementaj lernejoj kursojn gvidas s-inoj Marija Jerkovic, Ida Bogadi kaj Judita Rey Hudeček, kiu gvidas ankaŭ alian kurson en Centro por Edukado, Klerigado kaj Rekapablado de Infanoj kaj Junuloj. Gvidas kurson ankaŭ gimnaziano Jelena Lonĉarevic. Estas interese mencii ke ŝi komencis lerni E-on somere de 2002 en kurso de gimnazianoj Darko Blaĵic kaj David Rey Hudeček. Darko kaj David nun gvidas postkomencantan kurson por gimnazianoj. En Esperanto Societo Bude Borjan kurson por komencantoj gvidas s-ino Gordana Jurina kaj por progresantoj s-ro Vladimir Dujnic. C-superan kurson gvidas s-ino Spomenka Ŝtimec. S-ino Ankica Jagnjic gvidas komputilan kurson por

geavoj. En Studenta E-Klubo kurson por postkomencantoj gvidas s-ro Dag Treer.

En Slavonski Brod kurson en elementa lernejo gvidas s-ino Nela Donĉevic. En Osijek en E-Societo Liberiga Stelo kurson por komencantoj gvidas s-ro Hrvoje Sandukĉic. En Rijeka en E-Societo Rijeka kurson por komencantoj gvidas s-ino Josipa Katunar. En Matulji s-ro Emil Hrvatin gvidas kurson en elementa lernejo. En Sinj s-ino Mira Kocijanchic gvidas kurson por unu komencantino. En Zadar en elementa lernejo kurson gvidas s-ro Zdravko Jakovljevic. Ekzistas ankaŭ aliaj kursoj pri kiuj ni ne havas klarajn informojn.

Por lernantoj el elementaj lernejoj, en apudmara urbeto Kostrena, proksime de Rijeka, okazas ĉiujare konkurso pri scio de E-o [vd. *foton!*]. Ĉi-jare la konkurso okazis de la 23a ĝis la 25 de majo, ĉeestis 24 lernantoj el 7 elementaj lernejoj.



La ILEI-sekcio de Kroata Esperanto-Ligo kunvenis la 5an de aprilo 2003. Dum la kunveno oni pritraktis laborplanon de venonta periodo kaj elektis novan estraron. Prezidanto de la sekcio estas s-ino Ankica Jagnjic kaj sekretario s-ino Ida Bogadi.

Kontaktadreso: *Esperanto Societo Rijeka, Korzo 2 A, HR-51000 RIJEKA, Kroatio. Tel./fakso +385 51 228148, rete <esperanto-ri@ri.tel.hr>*

Emil Hrvatin, <esperanto-ri@ri.tel.hr>

Litovio

Esperanto en mezlernejoj

Fine de majo en du mezlernejoj de Vilnius finiĝis lernojaro de E-instruado. Instruis prezidanto de Vilnusia filio de Litova E-Asocio Gediminas Degesys. La lecionojn frekventis du klasoj. Sekvontjare ili daŭrigos. Ni planas instrui E-on en mezlernejoj de Vilnius multe pli vaste. Eblecoj estas. Multaj lernejoj tion deziras. Estas problemo pri manko de E-instruistoj. Tamen ni provos tion solvi. En Vilnusia distrikto en mezlernejo de Pagiriai E-on instruas Ina Norkiene, kies lernantoj antaŭ du jaroj vizitis Eŭropan parlamenton en Strasburgo. Ĝenerale en Litovio Esperanto estas konstante instruata ankoraŭ en deko da mezlernejoj. Precipe oni devas noti tre kvalitan kaj stabilan instruadon de Esperanto en mezlernejoj de litova urbo Marijampole, kie tion ĉefe faras sperta instruistino Danute Vidrinskiene, sed ankaŭ Angele Straleckiene. Ankaŭ iliaj lernantoj estis en Strasburgo en Eŭropa parlamento. Sed i.a. menciindaj estas ankaŭ Grazina Opulskiene en mezlernejo de Mazeikiai, Birute Slivinskiene en mezlernejo de distrikto Pakruojis, Leonarda Gauryliene en mezlernejo de Vilkauskis, Vera Valentaite en mezlernejo de distrikto Jonava kaj Brone Aukstikalniene en mezlernejoj de Pasvalys.

Povilas Jegorovas, litova.ea@mail.lt

Nederlando

Niza Kuiterman forpasis



'Esperanto estis ŝia plezuro kaj vivo'. Tion metis la parencoj de Niza Kuiterman sur la anonco de la forpaso de Niza. Ili pravas! Instruante, parolante, disdonante varbilojn, jes, ĉiamaniere ŝi aktivis por la disvastigo de E-o. Ŝokis nin ŝia neatendita morto dum la semajnfino de la 20-a de aŭgusto 2003. Nin, la E-geamikojn en Groningen, sed ankaŭ aliloke en Nederlando kaj eĉ en Gotenburgo, kie ŝi intencis partopreni la UK-on. En multaj UK-oj ŝi partoprenis, ne nur la proksimajn sed ankaŭ

en Brazilo, Islando, Kubo, Israelo k.t.p. Ŝi ĉeestis ILEI-konferencojn kaj aliajn E-kunestadojn malgraŭ la fakto ke ŝia sanstato ne ĉiam estis bona.

Pro tio ŝi gastloĝis dum la lastaj jaroj vintre dum kelkaj monatoj en Aŭstralio, kie ŝi ŝatis la varmon kaj krome la kontaktojn kun la tie loĝantaj esperantistoj. La groniga E-klubo perdis en Niza aktivan membron, eks-estraraninon, karan amikininon. Ni certe ne forgesos ŝin! Je la kremacio parolis nia prezidanto, Johan Swenker kaj Guus den Beste, same kiel ŝi ano de la Humanista Unuiĝo kaj ekslernanto de Niza. La E-flago kuŝis sur la ĉerko kaj 'la Espero' estis aŭdata. Ni esperas ke Niza ripozos en paco.

Wil van Ganswijk-Vlasblom, Nederlanda Sekcio de ILEI

Norvegio

Instruado en 2002

Ĉiun jaron Norvega Esperanto-Ligo okazigas kursojn. En 2002 la kursojn gvidis Irina Gončarova, kiu turneis tra pluraj urboj en Norvegio. Bedaŭrinde nur malmultaj kursanoj membriĝis, kaj tiel estis dum la pasintaj jaroj. En 2003 oni planas aranĝi lokajn kursojn per lokaj fortoj, tiel ke la kursoj povos daŭri pli ol semajnfino. Oni esperas ke tio pli bone kaptos la novulojn. Unu el la plej gravaj problemoj estas ke la norvega-Esperanta vortaro eldoniĝis en 1963, kaj la Esperanta-norvega eldoniĝis en 1948! Oni jam ekde multaj jaroj laboras pri nova N-E-vortaro, kaj en 2002 (kaj en 2003) tiu laboro ricevis financon subtenon. Post malmultaj jaroj aperos la nova vortaro.


Jardar Eggesbø Abrahamsen, <jardar@nvg.ntnu.no>

Pollando

Fare de Eldonejo HEJME reaperis konata lernolibro de Esperanto por junularo, originale verkita de SAT-Amikaro, "Esperanto Junul-Kurso". La lernolibro konsistas el du apartaj kajeroj:

1. Parto esenca 84 paĝoj – tute en Esperanto (6 EUR)
2. Helpilo por instruistoj – pola-Esperanta (1 EUR)

Por libroservoj validas triona rabato. Indikitaj prezoj ne inkluzivas sendo-



kostojn. Mendojn akceptas la eldonisto: *Eldonejo Hejme skrytka 59, PL 41-250 CZELADZ, <esperanto@hejme.e-tools.pl>*

Rumanio

S-ro Constantinescu pretigas dosieron prezentotan al la rumana ministerio pri edukado, kaj ŝatus havi specimenojn de informiloj pri E-o el la tuta mondo. Ĉu eblas helpi lin akiri specimenojn de la informiloj senpage sendataj al informpetantoj en via lando?

*D-ro Marian Constantinescu,
cal. Mosilor 258 bl.4bis ap.20. RO-020886 Bucuresti, Rumanujo*

Tanzanio

Estrarkunsido de TEA en Dar-es-salaamo la 20-an de aprilo 2003

TEA proponas ke por komenci la instruadon en Tanzanio oni ekuzu du instrumaterialojn 1) *Esperanto por Afriko de Emile Van-Dan* kaj 2) *Jifunze lugha ya Kiesperanto de Nino Vessela*. Tiuj materialoj ne postulas la ĉeeston de la instruanto. La kunsido decidis, ke la lecionoj estu tradukitaj ankaŭ en la suahilan tiel ke multe da homoj komprenu ĝin facile.

La asocio decidis, ke oni daŭrigu la korespondan instruadon.

Kaj konsiderante la fakton ke la nombro de la instruistoj en Tanzanio estas tre limigita la kunsido decidis komenci pli fortan rilaton kun ILEI tiel ke ĝis la jaro 2004 ILEI havu almenaŭ sekcion en Tanzanio.

*informis David Mapengo, ĝenerala sekretario de TEA
<davidomapengo@yahoo.com>*

Usono

Jarraporto de la usona sekciestro

Dum la pasinta jaro niaj estraranoj bone funkciis. La prezidanto, Ron Glossop, ne nur certigis ke iliaj taskoj estas faritaj sed ankaŭ ade ĝisdatigis nian membro-liston. La vic-prezidanto, Phil (Filipo) Dorcas, faris bonan laboron pri nia retejo; la kasisto, James (Jakobo) Droege, bone zorgis pri niaj financoj; nia koresponda sekretario Sally (Sali) Lawton fidele raportis pri la membro-kotizoj kiujn ŝi ricevis; kaj nia nova Eduka Sekretario, June Fritz, kolektis informojn pri E-klasoj en Usono. Krome, ĉiu el niaj ĉirkaŭ 60 membroj ricevis de la redaktoro, Doroteo Holland, kvar eldonojn de nia Bulteno, kaj de ILEI ĉiun numeron de IPR, ĉar ĉiu AAIE-ano estas aŭtomate membro de ILEI.

E-klasoj ja ekzistas en Usono, sed estas daŭra problemoj kolekti informojn pri ili. En ĉi tiu lando du esperantistoj diligente laboras tiurilate. Unu estas la nova Eduka Sekretario de AAIE, kiu petis ke ĉiu AAIE-ano raportu pri siaj kursoj. Tamen, malmulte respondis, kaj ŝi ne traktis klasojn instruatajn de ne-membroj. La alia kolektanto de kurs-informoj estas la Komisiito de Edukado de ELNA⁹, Kent Jones, kiu iel trovis kaj kuraĝigis instruistojn, ĉefe en publikaj lernejoj, starigi E-klasojn. En lastatempa raporto li listigis E-klasojn en Alaska, Arizona, California, Colorado, Florida, Illinois, Kansas, Massachusetts, Missouri, New Hampshire, New Jersey, Oklahoma, Oregon, Pennsylvania, Texas, Vermont, Virginia, West Virginia, and Washington. Nur 3 aŭ 4 estas listigitaj de la Eduka Sekretario de AAIE. Krome, neniuj faras tiun taskon rilate al elektronikaj E-kursoj.

Du instruadaj aferoj estas faritaj kunlabore kun aliaj grupoj: Perkoresponda kursaro estas administrata de ELNA, kaj tri nivelojn de ekzamenoj administras la Usona Ekzamena Servo.

Defio al AAIE estas plenumi la petojn de la UEA-komisiito pri Edukado:

- 1) Trovi E-klasojn kiuj partoprenos en Interkulturo.
- 2) Elekti kaj rekomendi papera(j)n lernolibro(j)n por instrui en unuagrada kursoj.
- 3) Elekti kaj rekomendi retan kurson en la angla.
- 4) Ordigi la usonan programon pri ekzamenoj kun tiu de ILEI/UEA.

Doroteo Holland, <dorothyh@west.net>

Responde al la artikolo de M. La Torre en IPR "Ĉu ni malaperu?" ...

Gejunuloj al ILEI!

Mi povus tuj membrigi en ILEI 100 valorajn kaj kapablajn gejunulojn el inter tiuj, kiujn dum la lastaj jaroj mi esperantistigis en mia Universitato. La lernintoj de E-o, 21-32-jaruloj (studentoj aŭ universitataj diplomitoj), plejparte loĝas dise tra la lando kaj komencas forgesi la lingvon... Regula

⁹ Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko

kontakto kun IPR kaj agado de bone funkcia internacia organizo ILEI, kaj ties landa sekcio

– certigus al ili kontakton kun la lingvo,
– familiarigus ilin kun div. aspektoj de E-instruado, kio - espereble - donus al iuj la ideon kaj kuraĝon instrui la lingvon.

La gejunuloj ne povas (aŭ komence ne havus intereson) mem pagi la ILEI-membrokoton. Estus inde trovi sponsorojn, kiuj – eble mem ne havante tempon agi por E-o (aŭ kapablon/emon instrui) – volus pagi unu aŭ kelkajn kotizojn. Indus – miaopinie – krei fondaĵon (nomota ekz. Fondaĵo "E-instruado", ĝi helpus ankaŭ kelkajn membrojn eksigintajn pro financaj problemoj, reveni al ILEI) kaj senĝene kolekti monon dum E-aranĝoj. Ĉiuj esperantistoj ja konscias pri la esenca rolo de E-instruado por ekzisto de la lingvo.

*Maria Majerczak
sekciestro de ILEI en Pollando*



Interkona kvazaŭludo de niaj konferencanoj (foto de Simon Smits)

LABORKOMISIONOJ

Ekzamena: Duncan Charters (prez.), Katalin Kováts (vicprez.), Bill Maxey (sekr.), Boo Mee Kim-Lindblom (kasisto), Probal Dasgupta, Gbeglo Koffi, Mireille Grosjean,

Elektita: Maritza Gutierrez (kunvokanto), Ana Montesinos de Gomis, Aurora Bute

Kontrolo: Ulla Luin, Bengt Jansson, anstataŭanto: Lars Forsman

Lerneja: Marija Belošević, Jennifer Bishop, Renato Corsetti, Stefan MacGill, Géza Kurucz, Maŭro La Torre, Raita Pyhälä

Regulara: Rob Moerbeek. **Terminara:** Maŭro La Torre

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

E@I (*Esperanto ĉe Interreto*, www.ikso.net), faka sekcio de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, www.tejo.org, poŝtadreso ĉe UEA)

FIPLV (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*):

Reprezentanto de ILEI: **Jennifer Bishop** ✉: esperanto@Education.monash.edu.au

IEI: *Internacia Esperanto-Instituto*, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando.

UEA: *Universala Esperanto-Asocio*, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. www.uea.org. A-komitato el ILEI: **Maŭro La Torre**. Observanto de ILEI ĉe UEA:

Radojica Petrović. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Gbeglo Koffi**.

UNESKO (en operaciaj rilatoj). Reprezentantoj de ILEI: **Renée Triolle**, Bello Bauco, Chemin de la Civade Verde, FR-13600, La Ciotat, Francio; **Jean-Pierre Boulet**, 17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Courmon d'Auvergne, Francio, tel. (+33) 4 73 84 90 60; **Mireille Grosjean**, Temple 20 pf. 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando, tel.+fakso (+41 32) 932 18 88, ✉: mireille.grosjean@rpn.ch

MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag sub numero 27.181.064. La membro inkluzivas ricevon de 4 numeroj de IPR jare. Turnu vin al via landa sekcio, kiu fikso kotizon en via propra valuto. Por pagi rekte al la internacia ILEI, skribu al la kasisto: *Boo Mee Kim-Lindblom, Stenbockens gata 102, SE-136 62 Haninge; tel. (+46 8) 777 4175*, ✉: boomee.kimlindblom@swipnet.se. *Postĝirkonto: 682117-7, Stokholmo. S.W.I.F.T. - kodo: PGSISESS*. Membro-kotizoj: A-landoj (laŭ UEA-divido): 18 EUR, B-landoj: 9 EUR. Simpla abono sen membreco: 18 EUR. Pro altaj banko-kostoj, evitu bankĉekojn kaj eĉ internaciajn poŝtoĝirojn; taŭge plenumita Euroĉeko plej bonas. Alia pagmaniero estas al *UEA, Nwe. Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, pĝk 37 89 64*. UEA akceptas kredit-kartajn pagojn. Klare indiku la celon de la pago. Kontoj ĉe UEA: ilek-a (ĝenerala), juna-l (*Juna amiko*) kaj pike-b (*Projekto Interkulturo*). Detala listigo de pagmanieroj al UEA aperas en Jarlibro. Prefere informu senpere la kasiston de ILEI pri la enpago. Abonoj *Juna amiko* 2004: Tarifo 1: 12 EUR, Tarifo 2: 7 EUR. Aera sendo: +30%. Signifaj rabatoj por kvantoj (ekde 2 ekz.) Perantoj en trideko da landoj. Vizitu: www.junaamiko.inf.hu. Reklamtarifoj por IPR: 180 EUR por plena, 110 EUR por duona kaj 70 por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton. Hejmpaĝo de ILEI ĉe: <http://il.uniroma3.it/ilei>

REDAKCIAJ INFORMOJ

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): R. Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende.

Presado: Flandra Esperanto Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Tel: +32-3-234 34 00.

Redaktejo: NÉMETH József, HU-8531 IHÁSZ, Fő u. 41/5. Rete: www.tarczy.rlan.hu/ipr/; jozefo@tarczy.rlan.hu, tel/fakso: +36-89/ 356-050.

Vicredaktorino: katalin@ikso.net. La revuo aperas ankaŭ kasete registrita por leghandi-kapuloj.

Informas: Rob Moerbeek, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk.

La nunan numeron ni sendis al la presejo la 8-an de septembro 2003,

redaktfino por la sekva numero: la 31-a de oktobro 2003.

SEKCIESTROJ

Albanio: Vasil Pistoli, c/o
Bardhyl Selimi, RR-5801 Alpa Corral
50, ap. 3, AL-Tirana
✉: selimir@albmail.com

Argentino: Teresita Alaniz,
El Mundo s/n, RR-5801 Alpa Corral

Aŭstralio: Penny Vos, 511
Wyndham Lane/Kanoona, Candel
NSW AU-2550

✉: penivos@yahoo.com

Belgio: Raymond Wylleman,
A. Vermeulenstr. 65, BE-8400
Oostende

✉: raymond.wylleman@pi.be

Brazilo: Marcos Zlôv
Zlotovich, C.P. 2641, BR-
01060-970 São Paulo - SP
✉: zlov1000@hotmail.com

Britio: Tellier Angela, 10
Marina Gardens, GB IP11 2HW
Felixstowe, Suffolk

✉: angela@tellier.co.uk

Ĉeĥio: Jana Melichárková,
CZ-696 02 Ratíškovice 938

✉: melicharkova@quick.cz

Ĉinio: Zhang Danchen,
General Foreign Languages Dept., 29-
34 North Part, Huazhong Normal
University, CN-430070 Wuhan
✉: zhan@uea.org

Finnlando: Carola Antskog,
Dragsfjärdvägen 690,
FI-25700 Kimito

✉: cantskog@kolumbus.fi

Francio: Joseph Catil,
5, rue des Calabres,
FR-69330 Meyzieu,
✉: joseph.catil@wanadoo.fr

Germanio: Michael J.
Schem, Von Thürheimstr. 47,
DE-89264 Weissenhorn

Hungario: József Németh,
Fő u. 41/5, HU-8531 Iház
✉: jozefo@tarczy.rlan.hu

Irano: Hamzeh Šafii, P.O. kesto
17765-184, IR-Teheran
✉: ilei.ir@esperanto.org

Italio: Luigia Oberrauch Madella,
via Prampolini 8,
IT-43100 Parma

✉: pianetaurano@libero.it

Japanio: Isikawa Tiekō
103, Tate 1-6-6, Siki, Saitama JP-353-
0006

✉: isksanjo@ff-e-mansion.com

Katalunio: Luz Vázquez,
Apartat 553, ES-43200 Reus
✉: ileicat@hotmail.com

Korea Resp.: CHO Sung Ho,
Department of Biology, Inha
Universitato, Incheon 402-751,
Koreio ✉: scho@inha.ac.kr

Kroatio/KEL: Ankaica
Jagnjić, Stubička 75,
HR-10000 Zagreb,

✉: ankaica.jagnjic@zg.tel.hr

Kroatio/KEU: Ivan Bekavac-
Basić, Kušalova 59,
HR-10000 Zagreb

Kubo: Pedro Fernández
Rodríguez, Requena No. 17 apto. 1
entre S.Allende y Lugareño, Plaza,
CU-10600 Ciudad de la Habana
✉: kubesp@enet.cu

Nederlando: Atilio Orellana
Rojas, Rionwstraat 172,
NL-2585 HW Den Haag,
✉: iei001@tiscali.nl

Norvegio: Björn Thuv,
I.F. Gjerdrums vei 33
NO-1396 Billingstad
✉: bthuv@r2i.net

Pollando: Maria Majerczak,
ul. Armii Krajowej 7, m. 122,
PL-30 150 Krakow, ☎: (+ 48
12) 638 1449

Rumanio: Mihai Trifoi,
Bl. 1/ap.3, Jud. Covasna,
RO-52711 Bixad
✉: trifoi@ionoris.ro

Rusio: Iina Gončarova,
Moloeznaja 38-10, Odincovo 2,
Mosk. obl. RU-143000
✉: mirina@online.ru

Svedio: Bertil Andreasson,
Södra Rörum pl. 455, SE-24294
Hörby ✉: bertil.andreasson@horby.mailtelia.com

Svislando: Mirelle Grosjean,
Grand-rue 9, Pf. 9,
CH-2416 Les Brenets
✉: mireille.grosjean@rpn.ch

Togolando: Attigbe-
Agbemedon B., Mensah, T. I. E. To,
B.P. 13169, Lomé-TOGO,
✉: esp.togo@cafe.tg

Ukrainio: Nina Daniljuk, prospekt
Sobornosti, 32-108, Luck-26, UA-
43026

Usono kaj Kanado: Doroteo
Holland, 5140 San Lorenzo Dr,
Santa Barbara, CA 93111-2521
(US) ✉: dorothyh@west.net

Venezuelo: Andrés Turrisi,
Cen.Res.Puerta del Este.Torre, Oeste,
piso15, ap.153, Av.Madrid, VE-1070
La California Norte, Caracas
✉: andesp@internet.ve

REPREZENTANTOJ

Armenio: Lida Elbakjan, Moldo-
vakan 26/2, kv.52, AM-375062
Erevan ✉: LIDELB@freenet.am

Bosnio kaj Hercegovino: Nimeta
Kulenović, Branica Sarajeva 15/V,
BA-71000 Sarajevo

Ĉilio: Héctor Campos Grez, Casilla
903, CL-3340000 ✉: hecg@uea.org

Estonio: Helgi Hromova,
Pk. 623, EE-12602 Tallinn

Islando: Loftur Melberg
Sigurjónsson, Traðarberg 13, IS-221
Hafnarfjörður, ✉: loftur@skyr.is

Israelo: Gian Piero Savio,
P.O.K.386, IL-84965 Omer
✉: gpsa@uea.org

Kongo DR: Ngangu Nduantoni-
Bakidila, B.P.13, CD-Lukala, Bas-Zaïre

Kostariko: Hugo Mora Polt-
ronieri, Apartado 4981, CR-1000 San
José ✉: miaumiau1@racsa.co.cr

Litovio: Algimantas Piliponis,
Karolinisiu 3-93, LT-2044 Vilnius
✉: piliponis@centras.lt

Meksiko (konfirmota) José de
Jesús Corrales C.,
Belice 116, Fraccionamiento
Guadalupe, Durango, Dgo.
✉: jdjcorrales@yahoo.com.mx

Nov-Zelando: Gwenda Sutton,
12C Herbert Gardens, 186 The
Terrace, NZ-6001 Wellington 1
✉: gwenda.s@ihug.co.nz

Portugaliao: João Jose Santos
Rua Damasceno Monteiro, 21-B r/c
dto.PT-1170-109 Lisboa
✉: j.j.santos@netcabo.pt

Serbio kaj Montenegro: Radojica
Petrović, Bul. oslobodjenja 36, 32000
Čačak ✉: radp@ptt.yu

Slovenio: Marija Zlatnar-Moe,
Miličinskega 66, SI-1000 Ljubljana.
✉: Marija.Zlatnar@guest.arnes.si

Uzbekistano: Eugeno S.
Perevertajlo, Abon. jashik 140,
Počtamt, UZ-700000 Taškento, CIS
✉: eugeny@gimli.com